Nº 462

# LA SKOLTA MONDO

Trimonata revu:
Januaro - Marto 1981
Volumo 6
Numero 1



Brazilo, lando de 66.ª Universala Kongreso 25/07 - 01/08

# SEL

SKOLTA ESPERANTO LIGO
Postbus 433
1500 EK Zaandam Nederlando
Poŝtĝirkonto 54 36 47
*****************

Fondita 1918
Fondinto "Avoto" A W Thomson.
Kunfondinto: J W Leslie.

Honoraj Prezidantoj:
Avoto, D H Davis, L J VanGulck
*****************

Prezidanto: C. Stanley Otto, 7 Longview Rd., Livingston, NY. 07039, Usono.

Vicprezidanto: Franco Abriani, Via Falconetto 24, I 37100 Verona, Italujo.

Ĝenerala sekretario: J K Hammer, Taxusstraat 7, 1505 AA Zaandam, Nederlando. Telefono: 075-16 69 31.

Kasisto kaj adminstranto de "La Skolta Mondo": D H Withey, 21 Brookfield Ave, Waterloo, Liverpool L 22 3ye, Britujo. Telefono: 051 928 2936.

Redaktoro: Hans Amund Rosbach, Bambleveien 2, 3700 Skien, Norvegujo. Tel: 035-21 8 48. Poŝtkonto 3 36 33 89.

Konsilantaranoj:

Afriko: Henri W Appel, 8 St. Michael Rd., New Redruth, Alberton 1450, Sud-Afriko

Ameriko: Paul Ronald, 45 10th Ave., Roxboro, Que, H8Y 2N3 Kanado

Aŭstralio: J Moore, La Nesto, Pelican Str., Emu Park, QLD 4703, Aŭstralio

Azio: Ŝindo-Seitaro, Nisimikuni-1-tyôme 200, Higasiyodogawa-ku, Osaka-si, Japanujo

# TUTE NOVA?

Jen vi havas en via mano la unuan ekzempleron de la nova "La Skolta Mondo". Ĝi havas novan grandecon, ĝi estas la unua presita en "la nova mondo", t.e. Ameriko aŭ pli precize en Usono. Ĝi tial ankaŭ estas la unua kajero en nova volumo. Tio eble signifas nenion por la plimulto de niaj mambroj - abonantoj - legantoj. Sed kelkiuj kolektas la revuon, eĉ bindigas ĝin, kaj por tiuj tio estas sufiĉe grava informo. Kaj por tiuj:
Se vi deziras por la pasinta volumo ian enhavoliston, bonvolu vin turnu al mi - t.e. la redaktoro - kaj mi sendos kontraŭ la kostoj (kiujn mi en la nuna momento ne konas).
En tiu ĉi numero - kaj en la postaj - vi ne trovos la liston de Naciaj Reprezentantoj. Ni nun havas ian reprezentanton en 50 landoj, kaj tia listo postulas du plenajn paĝojn. Malnovaj membroj ja jam posedas la liston, troveblan i.a. en la lasta numero de pasinta volumo, kaj novaj membroj povos peti ĝin ĉe la Centra Komitato. Renovigoj kaj ŝanĝoj en la listoj estu farotaj pere de informoj en LSM.

Ĉu tio estos la tuta ŝanĝo de LSM? - Nu, tio parte dependas de vi mem kaj de aliaj mebroj. La redaktoro ankoraŭ estas sama, kun samaj scioj kaj preferoj, samaj emoj kaj deziroj, samaj limigoj. Ni volus havi "konstantajn rubrikojn", ekzemple pri la korespondemuloj. Kun skoltaj kanzonoj aŭ pri skolta literaturo. Sed kiam mankas la materialo por tio, ankaŭ mankos la rubrikoj - kiuj fariĝos ne konstantaj, sed hazardaj. Ni deziras legaĵon por komencantoj, por la plej junaj, sed ankaŭ por la pli aĝaj de jaro aŭ de lingvoscio. Ni tutkore akceptos ĉian helpon!

Se ni ĉiuj kunlaboros, ni povos el nia modesta revuo krei taŭgan kaj fortan interligilon kaj informilon por la skoltoj de la mondo!

Hans Amund

# salutletero al la membroj

Dankon pro via intereso kaj daŭra subteno! Mi dankas al John Berggreen pro la sindona kaj fervora agado dum la lastaj dek jaroj. Sub lia gvidado SEL akiris rekoniĝon de la du gravaj Mondaj Skoltaj Oficejoj kaj gajnis respekton ĉe ĝiaj staboj. Ni konservu tion! John ankaŭ gajnis reprezentecon en pli ol 50 landoj. MULTEGAN DANKON! Ni proponas al vi lokon inter niaj Honoraj Prezidantoj kune kun Avoto, D.H. Davis kaj L. J. van Gulck.

Venis tempo por nova Centra Komitato, kaj kongresanoj en Stockholmo elektis min nova prezidanto, la sepa en la Ligo. Mi ŝatas la nombron 7! Kun mi venas fervora skolteduk-anto kaj -gvidanto el Italujo, Franko Abriani, kiel vicprezidanto, aŭ pli vere helpprezidanto. Restas mia malnova amiko Ko Hammer kiel eminenta Ĝenerala Sekretario kaj la por mi nova amiko H A Rosbach kiel redaktoro. Dum la lastaj tri monatoj de 80 mi evoluis mian laborplanon por la venanta jardeko, kun ideoj kiuj postulos kaj tempon kaj konsideron de la Centra Komitato.

Ni estas skoltoj kiuj membriĝas al internacia societo. Skoltoj malsimilas al aliaj ĉar estas celo malantaŭ ĉio, kion ni faras. Ni devas memori, ke la fina celo ne estas lerni kaj uzi Esperanton, sed sperti novajn aventurojn en la skoltismo per kaj pro nia scio de Esperanto.

Ni loĝas en mondo kiu rapide ŝanĝiĝas, kaj ni esperas: pliboniĝas. La skolta movado ne rapide ŝanĝiĝas, sed necesas ke ĝi ŝanĝiĝu kun la mondo. Problemo estas, ke nur malmultaj rekonas la gravecon de pliboniĝo en la skolta mondo, sed Skolta Esperanto-Ligo per siaj medioj havas bonegan oportunon montri, ke ni povas esti estroj de tiu ĉi pliboniĝo: Ni estas la unu nura organizita internacia societo de skoltoj ekster la oficiala monda konferenco.

Estri ilin signifas oferti revoluciajn ideojn por la loka skolta programo. Kelkajn ni devas traduki en naciajn lingvojn por altiri la skoltojn, poste ili lernos ĝui aliajn kiam ili scios nian lingvon. Ni bezonos bonkvalitajn eldonaĵojn, verkojn sur persona tereno kie ideoj en riĉa literaturo stimuligas al adopto en konsilejo aŭ trupo novajn programerojn. Ni devas trovi respo-ndeculojn kiuj varbos SELan ĉiu preta kontribui al la ... igo de nia literaturo kaj s... eto.

Bone - sed kiel? Ni estas ... malgranda, sed ni ekzistas, ... havas nomon en internaciaj ... atoj kun funkciantoj sur int... nacia tereno. La sukceso ne t... dependas de ni mem, sed la fo... de la ĝenerala Esperanto-mov... helpos nin. Sed vi demandas ... Kial SEL dum pli ol 60 jaroj ... jam venkis?

La respondo estas malfacila, ... daŭre okupas la CK'n, sed ba... agoj estas: flankaj organiza... al la Nacia Reprezentaro, pr... rameroj adoptindaj, bone pl... itaj varbo-kampanjoj, sed an... ĉio vera kontakto kun la sko... aro en ĉiu lando.
Unue ni devas kompreni la ba... de malvarbaro.
"Kial lerni duan lingvon? ... postulas tempon, laboron, ... elspezon". Vere, sed tio ta... ne estas la kialo. La entuzia... Esperanto-varbanto ofte forge... ke ĉiu havas siajn bezonojn, ... zirojn, aspergojn, celojn en ... vivo. Ne emfazu Esperanton, ... tio malŝparas vian valoran t... pon kaj ofte gajnas nenion k... malakordeco. Simple ne men... ĝin aŭ SEL al aliaj, komence... Venos la tempo, estu pacienc... Esperantovarbado estas delik... afero kaj postulas personan ... ntakton kaj memkonvinkiĝon ... tiu, kiun mi nomas la venkot...

Ni devas unue pensi: Kiel ... povas amikiĝi kun la venko... Kiel mi povas fariĝi apoga... por li? Tio postulas simp... komprenon de HOMAJ RILATOJ. ... vi memoras la Oran Regulon? ... la skoltismo: ĉiutagan bonse... on. Rafinu tion iomete: ... bonservon kompleksan, tiel ... li donos al vi plenan me... atenton. Mi diras "kompleksa... ĉar lernado de Esperanto es...

ankaŭ kompleksa temo.
Unue en la skoltaro spertaj virskoltoj scias kaj ne scias, ke la nacia skolta konsilejo aŭ oficejo ne havas direktan influon super la vivo de la loka konsilejo - kaj ĉi tiu unuo, la KONSILEJO, estas pli grava ol io ajn alia al NI. La konsilejo konsistas el tri grupoj kunlaborantaj por doni al la geknaboj la plej eble bonan skoltadon. La unua grupo estas la administra (programo, helpoj, insignoj), la dua estas la civitanaj komitatoj kiuj planas programon, kiun la administra "oficejo" plenumu. Tiun grupon estras la konsileja prezidanto, kaj ĝi konsistas el la diversaj komitatoj el la centra estraro de la konsilejo. La tria grupo estas la skoltaj distriktoj: la komisara stabo, la skoltaj trupoj - kies patrolanoj estas la geknaboj. Por ĉiu deko de geknaboj almenaŭ unu plenaĝulo kiu subtenas ilin. (Se estas alia strukturo en via lando, bonvolu informi min.)

Ni avertas vin, ke "falsa kontakto" povas malhelpi. Ĉiu plenaĝa skolto havas sian komisiitan laboron, kaj kio koncernas lin, ne gravas al aliaj. Kio do estas signifa por vi, estas grava nur al unu persono. Tial ne la trupgvidanto nek la distrikta aŭ konsileja estro, nek la nacia skolta oficejo, sed nur via loka konsileja skoltedukanto estas kontaktenda. Li estras la komitaton pri skolta edukado, volas krei bonkvalitajn estrojn por la trupoj, kaj planas la kursojn. Kvankam li multrilate scias pli ol vi, li ne konas la mondajn interrilatojn, via specialigita intereso. Al li prezentu ilojn por plisukcesigi trupajn programojn.

Esperanto-agado ne estas unue la solvo! Jes, laŭ via opinio - sed vi ne konas lin, kaj ne povas konvinki lin estante strangulo. Post la unua kontakto montru intereson pri lia tasko, iru al liaj komitataj kunvenoj kiel interesulo, kaj fine proponu interesan kurson al li (mi posedas manuskripton de nova kurso de la eminenta Usona reprezentanto Robert W Rapp, kaj mi intencas pretigi ĝin en malsamaj naciaj lingvoj). Tiel vi faru la bonservon, kaj poste ne ĝenu lin. Se li ne surpriziĝas kaj telefonos al vi, la negativa reago avertu vin ke vi devas viziti aliajn.
La dua persono kontaktenda estas la 'rondtabla' komisaro. La rondtablo kunvenas ĉiumonate por diskuto kaj ideointerŝanĝo. Ankaŭ al tiu prezentu ideojn por ilia programo: Ekz. serion da lertecoj skoltaj por unuopaj patrolaj kunvenoj. Ofte mankas literaturo nacia, sed mi havas kaj volas pretigi ĝin diverslingve. Krome vi legos pri tio en LSM. Ju pli vi helpas per literaturo skolta pri program-

Ne subite prezentu vian programeron pri SEL! Monato aŭ du devas pasi! Nur kiam vi sentas ke la tempo kaj loko maturas, vi prezentu tiun duan programon. Estu zorgema pri la prezentado, tiel ke vi tuŝos lin mense. Vi petu lian konsilon - "Virskoltoj en fremda lando aŭ kontinento ja elektis vin esti skolta reprezentanto aŭ peranto por ili en via lando, kaj kiel fari tion?" Li certe demandos pri tiu societo. Respondu konfideme, parolu nur pri la "ĵamborea lingvo" ĝis li demandas ĉu tiu lingvo havas aliajn uzojn. Tiam li estas preta, ricevi la tutan informon pri Esperanto kaj SEL kaj monda skoltado!

Nun vi devas unue venki vian novan amikon al memkonvinkiĝo pri lernado de la lingvo. Kiam li spertas ke la lingvo estas facila, li baldaŭ havos leteramikojn kaj konvinkiĝos pri la utilo kaj iĝos entuziasma. La entuziasmuloj regas la skoltaron!

Kaj nun komencas la pli zorgemaj planoj:
Vi devas trovi grupon de lokaj esperantistoj kiuj promesas du servojn aŭ eĉ pli: Instrui, krei Konsilejan Esperanto-klubon por ke la freŝbakitaj povu praktiki la lingvon kaj ĝui la kuneston por monda skoltado. Necesas, ke ili starigu novan komitaton en la konsilejo - por "mondaj interrilatoj".

Pri ĉio ĉi tio skribu al mi!

C.Stanley Otto,
Distrikta Helpkomisaro.

# BRAZILO

la lando de la Universala Kongreso 1981, estas tre interesa lando. Ĝi estas tropika lando, ĝi estas granda lando - jes, tiu lando sola estas pli granda ol tuta Eŭropo. Krome ĝi estas lando kun tia riĉo de diversaj aspektoj ke vi nenie trovas ion kompareblan - hipermodernaj metropoloj kaj tute primitivaj vilaĝoj, efika kaj moderna meĥaniko kaj vastaj distriktoj kie la homoj vivas en la ŝtonepoko.

En tiu lando troviĝas preskaŭ ĉiuj mineraloj, kaj pro tio kaj pro sia grandeco, ŝajnas verŝajne, ke tiu lando havos tre grandiozan estonton. Kaj en tiu lando la homoj de ĉiuj popoloj kaj rasoj vivas en komuno.

Du trionoj de la lando estas alta lando, t.e. de 300 m ĝis 1200 m super marnivelo Sed la pintoj ne estas tiel altaj kiel en Svisujo, Peruo kaj Ĉilio.

En la nordo la plej granda rivero de la mondo, Amazono-rivero, fluas. En la pluva sezono ĝi premas dolĉan akvon ĝis 200 Km en la Atlantikon! Ankaŭ aliaj grandriveroj ekzistas, i.a. la Paraná-rivero kun la 70 metrojn alta kaj tre bela Iguassoakvofalo, kiu altiras ĉiam pli multajn turistojn.

La 22.an de aprilo 1500 la portugala maristo Pedro Alvares Cabral kiel la unua eŭropano venis al Brazilo kaj donis al la reĝo de Paortugalujo la suverenecon de la lando, laŭ la tiama kutimo. Tio eĉ estis post interkonsento inter la hispana kaj la portugala reĝoj, ke ĉio okcidente de la 50° apartenu al Hispanujo, ĉio oriente al Portugalujo. Ke Brazilo tamen havas grandan teritorion okcidente de 50° baziĝas en la aventuremo de la portugalaj esploristoj.

Tamen en la komenco la aŭtoritatoj malmulte montris sian intereson. La kolonioj en Hindujo estis multe pli interesaj kaj valoraj, kaj nur por konservi la suverenecon oni en 1532 kaj 1549 komencis pli sisteman koloniadon. Oni fondis urbojn, kreis plantaĵojn, ekkulturis sukeron. La nederlandanoj ankaŭ montris intereson - sed post 1654 la portugalanoj vere regis la grandan landon. Kiam oni ĉ 1700 trovis oron kaj poste gemojn, la centro ekonomia kaj politika moviĝis suden, Rio de Janeiro fariĝis ĉefurbo. Sed la orminejoj ne pro tio la kolonia sistemo ne plu estis populara. Milito furiozis en Eŭropo kaj havis paralelon en "la nova mondo". Jen la portugala reĝo devis serĉi rifuĝon en Rio - Brazilio ne plu estis kolonio, kaj kiam reĝo Johano VI reiris al Portugalujo lia filo Petro restis en Brazilo kiel regento, kaj en 1822 proklamis la sendependecon de Brazilo kaj fariĝis la unua imperiestro. En 1889 la lando fariĝis respubliko, kaj nun prezidanto nereelektebla gvidas la landon dum kvinjaraj periodoj.

En 1960 la lando ricevis novan ĉefurbon Brasilia. Tiu urbo fondiĝis kun intenco fariĝi ĉefurbo, kaj konstruiĝis sur la maldense loĝata altebenaĵo en Goiás. La arĥitekto Oscar Niemeyer ricevis taskon desegni la oficial-konstruaĵoj, dum Lúcio Costa ellaboris la konstruplanojn por la tuta urbo. La urbplano similas al granda aeroplano, kaj estas ĉe la bordo de giganta artefikita lago, 80 km longa. La korpo de la aeroplano estas la oficiala parto kun parlamento, ministerioj, prezidenta palaco ktp, dum la "flugiloj" estas la komercaj kaj loĝdomaj partoj de la urbo - kiu nun havas 700 000 enloĝantojn.

Famaj aŭtoroj estas Machado de Assis, (1839-1909) kaj Jorge Amado, naskita en 1912. Pentristo fama estas Cándido Portinari (1903-1962) kaj inter skulptistoj Aleijadinho (1730-1814) estas la pli fama. Li estis duonnegro, ekzemplo ke rasa diskriminacio ne regas. Alia ekzemplo de tio estas la eble pli fama, speciale inter gejunuloj, Edson Arantes do Nascimento, pli bone konata sub la nomo Pelé.




LA PRAKTIKA TASKO.

La komanda ŝnuro.

Antaŭ kelkaj jaroj la Komanda Ŝnuro prezentiĝis en "Boy's Life kiel granda projekto por la patrolo, por la uzo ĉe kampado kaj je akcidentoj, sed bedaŭrinde tia klasika utililo preskaŭ estas forgesita. Kaj kiam vi rigardas ĝin, la kaŭzo por fari ĝin ja estas sekreto. Nur kiam vi venontfoje estos en kampo, ĝia taŭgeco montriĝos al vi. Vi trovos por ĝi sennombrajn uzojn, kaj via propra penso trovos plurajn.

Serĉu en iu instrukciilo kiel fari la "okulan splison". Se vi ne mem havas instrukcion, via skoltestro certe havas.

Vi bezonas ŝnuron 1/4' dika. Metu ĝin ĉirkaŭ vian talion triaŭ kvar-foje antaŭ ol detranĉi vian pecon. Faru okulan splison je ambaŭ finoj, la pli granda estu minimume 7 cm diametre, kaj la alia estu precize tiel granda, ke vi povas meti lignopecon en ĝin. (3/4' dika, ĉ 15 cm longa).




Poste iru al via skoltestro kun la Komanda Ŝnuro surloke ĉirkaŭ via talio.

ASM cso sept 1980



# 80 !

Du el niaj veteranoj pasis sian 80-an naskiĝtagon dum la unua jarkvarono de tiu ĉi jaro.



Temas pri nia honora prezidanto Jozef van Gulk, kiu trapasis la gravan ŝtupon de la vivo la unuan de februaro.

La alia jubileulo estas Charles Bardsley, kiu preterpasis la mejlo-ŝtonon jam la trian de januaro.

Nian tutkoran gratulon al ambaŭ!

La adresoj estas: Lt Lippenslaan 33/b 10, B 2200 Borgenhout, kaj: Crossbank House, Oldham OL9 JD.

# ni ricevis

Turisman kalendaron 1981 - kiu estas bonega informilo pri la Esperanto-aranĝoj en la diversaj landoj dum 1981. Krome ĝi donas iom da statistiko, enavas kalendaron ktp. En nia ekzemplero unu paĝo bedaŭrinde estis tute nelegebla - sed kion fari? Se ni havus por ĉio sufiĉe da mono, ĉio estus senriproĉa. Dankon al Monda Turismo kaj Tejo, kiuj prenis sur sin la taskon kolekti kaj eldoni ĉi ĉion!




KOMENDA HUFCA BESKIDZKIEGO ZHP en Bielsko-Biala aranĝos internacian junularan Esperanto-Jamboreon en arbaroj apud la urbo Sierwierz, Pollando, en la tagoj 14a - 28a de julio.

Skribu al Komenda Hufca Beskidzkiego ZHP, 43-300 Bielsko-Biala, str. Chopin 3, Pollando

STEIRISCHE PFADFINDER UND PFAD=FINDERINNEN incitas al Aŭstria Jamboreto 1981 en la tagoj 28a de Julio - 8a de Aŭgusto en Stift Rein, norde de la urbo Graz en Aŭstrio. Oni havos programojn por 10-14aĝaj por 13-16 aĝaj kaj por 16 - 19 aĝaj knaboj kaj knabinoj, sed ne en miksitaj trupoj. Skribu al Steirische Pfadfinder und Pfadfinderinnen Bundeslager-sekretariat, A 8010 Graz, Kaiserfeldstrasse 8, Aŭstrio.

Nia vicprezidanto skribas pri tio: "Se ni sukcesos kunigi patrolon de 8 knaboj aŭ knabinoj esperanton parolantaj, aŭ balbutantaj...(unu patrolo el ĉiu nacio)...povos kunveni granda reprezentado de SEL en relative malgranda medio de geskoltoj: 5000 proks. - Se ne estos eble sendi tutan patrolon sendu duonan..aŭ kvaronan..kaj pli malbone ĉeestu almenaŭ vi mem!"




›r ĉiuj skoltmembroj.

ı Vi Havas Skoltan "Totemo-n"?

ıu el la malnovaj skoltaj tradicioj ›tas, ke membroj de la skolta movado ›uj skribas al iliaj skoltamikoj uzas ›mmarkon krom aŭ anstataŭ onies nomo. ›oltoj nomas tion "totemo", kiel la ıdianoj en pasintaj centjaroj en la ›cidenta Ameriko.
ı deziras kuraĝigi vin uzi tian je ›no de viaj leteroj kaj aliaj komu- ›koj inter amikoj en SEL, kaj eĉ ıter esperantistoj kiam la temo de ›a letero rilatas al skoltado. Ĝi ›ntras, ke vi estas nuna aŭ estinta ›mbro de via skolta asocio, kaj ke ı sekvas la skoltan leĝaron kaj la ›omeson en ĉiutaga agado.

›el vi akiros tiun totemon? Tre ›mple. Se vi estas aŭ estis skolto, ı apartenis al iu patrolo, kaj kio ›n estas la nomo de tiu patrolo, ĝi ›tas via flanknomo. Se vi nuntempe ›tas en tiu patrolo, petu ĉe ĝia ›kvonta patrolkunveno, ke vi ĉiuj ›cidu pri totemo. Se vi estas iama ›olto, adoptu markon kiu plaĉas al ı kaj havas signifon en via vivo.


› vi estas tenanto de Ligno-Insigno, ›o devas esti tre facila por vi, ĉar ›aŭ skolta tradicio ĉiu Ligno-Insigna ›oltestro ja devas havi totemon. En ›ono la Ligno-Insigna patrolo devas ›kluzivi la kursnombron, kaj ĉiu ›trolano devas havi en la nommarko ›a ĉefliterojn de lia nomo. Ĉu tio ›tas sama en aliaj landoj?

Jen ekzemplo de la totemo de C. S. Otto, nova prezidanto de la Skolta Esperanto-Ligo:




S-ro Otto estas L.I.-kastoro kies kursnombro estas N.E.IV-19 (Usono, 1979). Ĉu vi povas trovi ĝin en la totemo?

Alia ekzemplo estas la kastora totemo de lia L.I.-patrolinstruisto:




"Kastoro" estas BEAVER en la angla lingvo. Ĉu vi estas kastoro, perdriko, aglo, vulpo, aŭ strigo aŭ io alia? Nomoj de patroloj aperos en kelkaj numeroj de La Skolta Mondo.
Eble vi povas sendi vian totemon al la redaktoro por registrado kaj oficiala apero en nia revuo?

Ora Kastroro.


# LUPIDOJ POVAS

John Swee

El la angla skoltgazeto ni tondis ĉi suban kaj apudan:

Vi bezonos: ses longajn bastonojn, unu mallongan, kvin malplenajn plastikajn botelojn (por likva lavilo), ok elastajn ŝnurojn, bobenon por fadeno, tratranĉitan kanon, grandan skatolon.

1. Elmetu viajn bastonojn kiel montrite.
2. Kunligu ilin je la x'oj.
3. Per ardanta fero (Tasko por la gvidanto!) faru truon tra la bastonoj je la plej supra punkto de la diagramo (y). Rehejtu vian feron kaj metu ĝin tra la jam faritaj truoj, tra la truon de la bobeno, kaj en la mezon de la restanta, sesa longa bastono.
4. Per la varma fero faru truon en la fundo de ĉiu el la boteloj - precize sufiĉe grandaj por la bastonoj. Faru "kolumon" el kaŭĉukaj ringoj sur la fino de la bastono por malhelpi ke la "radoj" perdiĝu. Atentu ke ili povu libere sin turnu.
5. Metu skoltan standardon sur la tranĉitan kanon kaj metu ĝin tra la truoj, kun la bobeno inter la kruco kaj la radon portanta bastono. Tiel vi povas kaj direkti vian ĉaron.



5






Jam multaj landoj eldonis skolto-poŝtmarkoj. Jenaj el Botswana eldoniĝis pro la 22a Monda Skolta Konferenco.

- jes, 5 landoj ĝis nun anoncis eldonon de skoltaj poŝtmarkoj dum 1982 pro la 75-jara jubileo de la skoltismo. Tiuj 5 estas: Fiĵo, Haito, Kenua, Papuo Nov-Genuo kaj Peruo. 6 aliaj landoj verŝajne faros la samon.

En Italujo eldoniĝis nova poŝtmarko-katalogo: Pri skoltaj poŝtmarkoj en Azio. La katalogo havas 180 paĝojn, kaj kolore redonas 399 poŝtmarkojn, 43 landkartojn kaj 61 naciajn flagojn, kaj informas pri geskoltaj programoj en Azio.
Pli frue eldoniĝis similaj katalogoj pri Eŭropo (1970), Ameriko (1974) kun suplemento (1977).

Du novaj skoltaj landoj rekoniĝis.
Jemeno, araba ŝtato, akceptis la skoltismon dum 1972, kaj skoltoj partoprenis Islamanajn kunvenojn en Mekko, la arabajn konferencojn kaj arabajn ĵamboreojn dum 1978 kaj 1980.
Zimbabvo jam havas skoltojn ek de 1909 dum la lando nomiĝis Suda Rhodesio, kiel branĉo de la brita skoltaro. Post 1959 estis nur unu skolta asocio, malferma por ĉiuj.
Tiuj du landaj skoltaj asocioj rekoniĝis kiel membroj de la Monda Skolta Movado ek de 1981.

En la araba ŝtato Kataro (Quatar) estas ĉ 4000 skoltoj. El tiuj multaj laboris por purigi strandojn. Estas ja multe da oleo en tiu lando, sed ĝi devas prefere ne troviĝi tie, sur la strandoj. Dum 60 tagoj la skoltoj laboris per tiu tasko.

Ankaŭ aliaj skoltoj faris utilan laboron. Skoltoj ofte amuziĝas per pionira konstruo, ekz. de pontoj, sed post la amuzo tiuj laboroj havas malmultan utilon. En Indonezio skoltoj kreis ion pli daŭran: Pli ol 2000 skoltoj uzis 3 tagojn por konstrui 2½ km longan, 1 metron larĝan kaj profundan kanalon. Tiu kanalo nun portas akvon al riz-kampoj, kaj ebligas rikolton dufoje en la jaro anstataŭ unufoje.

La monda ĵamboreo okazos en Alberta^Kanadujo, dum la tagoj 4a - 14a de Julio 1983. Oni elektis tiun tempon, ĉar la plimulto de la skoltoj en la mondo tiam havas lernejan libertempon Oni ne sukcesis trovi tempon en kiu ĉiuj libertempas.

Oficiale la Norvega Reĝa Ministerio por Eksteraj Aferoj eldonis belan broŝuron "Rigardo al Norvegujo". Ĝi estas senpage distribuata en eksterlando, kaj ni tial petas vin: Turnu vin al norvega konsulejo aŭ ambasado kaj petu ĝin!
Se vi ne havas adreson de konsulejo aŭ ambasado, skribu rekte al la Ministerio:
Norvega Reĝa Ministerio por eksteraj aferoj, Boks 8114 Dep, Oslo 1, Norvegujo.


# St. = Stelo.

La Stelo estas la monunuo de la esperantistoj. Malsimile al la naciaj monunuoj, la guldeno, dolaro ktp, la Stelo estas stabilvalora. Sed kion signifas tio?

Nu, se la kosto de koltuko skolta antaŭ kvar jaroj estis dek Steloj, (aŭ Kvinguldenoj) la kosto nun estas ankoraŭ la sama en Steloj, kvankam vi devus pagi ses guldenojn en la butiko.
Ni diras, do, ke la 'aĉetpovo' de la Stelo restas konstanta, spite de la faloj en la aĉetpovo de la naciaj monoj.


La Stelo originis en Nederlando en la jaro 1946, kaj ĝi ricevis la nomon por montri, ke ĝi apartenas al la Esperantistoj. Dum multaj jaroj oni uzis kuponojn por la Stelo, sed en 1960 oni faris ankaŭ monerojn, kaj tiuj moneroj estas ankoraŭ uzataj.

Ĉu vi iam vidis la Stelo-monerojn aŭ kuponojn?



Grandurbo. Jen alia bildo el la ĉefurbo de Brazilo, la ĉefurbo ĉi-somera de Esperantujo - Brasilio. La tuta urbo estas novkreita, kaj la arkitekturo tre moderna. Ni havas rigardon al la palaco de la Nacia Kongreso.

La supran sendis al ni-s-ro Lawrence Mee, Rotterdam, responde al no[illegible] en LSM 3/1980 pri monounuoj. Dankon! Kaj se aliaj havas aliajn kon[illegible] tojn al LSM, mi salutas ilin bonvenon en la revuon!



Motivo el la ĉefurbo de Esperantujo en la jaro 1981: La urbo de la 66a Universala Kongreso de Esperanto, BRASILIA.
Maldekstre sur la bildo vi vidas la monumenton al la Pioniro, kaj centre/dekstre la palacon de la Nacia Kongreso.

LA SKOLTA MONDO REDAKCIO: Bambleveien 2
N 3700 Skien.

NE ISSN 0037 6558